**Sekcioj kaj membronombro:** Fine de la jaro 1950 L.E.E.N. havis 30 sekciojn, sed likvidiĝis sekcioj Breda, Culemborg kaj Hengelo (jam longe agoniintaj) kaj sekcio Vlissingen kontraŭregulare ekzigis. Feliĉe aliĝis novaj sekcioj en Alkmaar kaj Bussum, kiuj ambaŭ montris goĝigan aktivecon. Fine de la jaro 1951 la nombro de estis 28. Kiel kutime pluraj membroj ekzigis, kelkfoje eĉ sen antaŭa averto antaŭ la 10-a de nov., sed la perdon jam preskaŭ plene kompensis aliĝo de novaj anoj en la daŭro de la jaro. La sekciaj kotizoj variis de g. 4,- (Bergen, Enschede) ĝis g. 13,- (Leiden); plej ofte la jarkotizo estis g. 6,- g. 8,- aŭ g. 10,-. (Utrecht kaj Eindhoven ne respondis la koncernen demandon). En la plimulto da sekcioj la anoj pagas kvaronjare; en kelkaj sekcioj monate aŭ eĉ ĉiusemajne. El niaj sekcioj 9 kunvenis dufoje en monato, 8 ĉiusemajne kaj 2 ĉi monate. La aliaj kunvenis neregule aŭ ne respon-

**KARAVANO DE L.E.E.N. AL OSLO**

En la komunikoj en la antaŭa numero ensteligiĝis eraro. La vagonaro foriros ne la 30-an de julio sed la 31-an. Pro plialtiĝo de la vojaĝkostoj ĉe la nederlandaj kaj skandinavaj fervojoj ni devas ŝanĝi nian favorprezon, kiu nun estas g. 147,-. Ni esperu, ke la fervojoj ne denove faros kapriolojn!

Oni demandis, ĉu oni rajtas kune vojaĝi al Oslo kaj unuope revojaĝi. Kompreneble oni rajtas fari tion, sed tiukaze oni devas pagi la plenan sumon, do proks. g. 180,- kaj ne profitas event. rabaton de la pasportkostoj, sed mem devas prizorgi sian tutan vojaĝon. Rabatoj validas nur por personoj, kiuj partoprenas la karavanan tien kaj ree. La karavano povos okazi nur, se sufiĉe da partoprenantoj anoncas sin. Oni do anoncu sin kiel eble plej baldaŭ, ĉar la aranĝoj ĉe diversaj instancoj postulas multan tempon. Do, ju pli frue ni povos ordigi la aferojn, des pli certaj ni estas, ke ĉio aranĝiĝos glate. Anoncu vin tuj, ne jam sendu monon, sed sciigu viajn nomon, antaŭnomon, naskiĝdaton kaj -jaron al la gvidanto, s-ro E. de Wolf, J. de Breukstraat 18, Haarlem, por la pasporto.

dis la koncernen demandon. Plurloke niaj sekcioj kunlaboris kun lokaj sekcioj de tendencaj Esp.-asocioj; en diversaj urboj (Groningen, Den Haag, Rotterdam, Eindhoven, Bergen op Zoom, Alkmaar, Deventer) oni tiucele fondis specialan kunlaborkomitaton. Por la kursarango oni uzis diversajn propagandmetodojn sed la rezultato ofte malsuperis la atendojn. Generale oni konsideris personan kontakton la plej efika kaj plej malmultekosta metodo. Pluraj sekcioj sukcesis varbi donacantojn kaj pro tio disponis pri ekstra monsumo por propagandaj celoj. Laŭtradicie sekcioj Almelo kaj Sneek ne respondis la demandaron. Iliaj ekzemplon ĉi foje imitis sekcio Heerenveen. Ni do ne scias, ĉu entute ili okazigis kunvenojn en 1951.

**Kursoj:** La malbona ekonomia situacio malfavore influis la propagandan agadon kaj nur kelkaj sekcioj sukcesis aranĝi kursojn kun kontentiga nombro da partoprenintoj. Pluraj sekcioj tute ne klopodis en tiu direkto. Gojiga fakto estas, ke en multaj lokoj Esperanto nun estas instruata en unuagradaĵ lernejoj kaj seminarioj. Ĉar nur kelkaj sekcioj sciigis detalojn, ni ne povas doni fidindajn informojn pri la nombroj da kursoj kaj kursanoj. Nian skriban kurson por komencantoj (teksto de s-ro H. Bakker, kursgvidanto s-ro S. S. de Jong) partoprenis nur malmultaj kursanoj el kiuj nur kelkaj finstudis la kurson, sed tamen ĝi, same kiel pasintjare, rezultigis modestan monprofiton. Pluraj anoj partoprenis la skriban kurson por progresintoj (gvidanto s-ro H. A. Appel) kaj kelkaj el ili sukcese trapasis la ekzamenon. En kunlaboro kun F.I.L.E. ni aranĝis 27/7 - 2/8 some-rajn kursojn en Soesterberg, kiuj bonege sukcesis, ankaŭ laŭ financa vidpunkto. Proks. 95 kursanoj, inter kiuj troviĝis multaj anoj de F.I.L.E. kaj kelkaj aliaj eksterlandanoj, partoprenis la kursojn. (finota)

**EXAMENS IN 1952**

Examens voor diploma A en B zullen worden afgenomen op 22 Mei (Hemelvaartsdag) te Amsterdam en Groningen, op 21 Juni te Den Haag en op 8 November te Utrecht.

Aanmelding uiterlijk 6 weken vóór het examen bij de secr., mej. H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29, Badhoevedorp.

Prospectus en aanmeldingsformulier worden op aanvraag gratis toegezonden door de secretaresse van de examencommissie en de alg. secr. van L.E.E.N.

Fine de januaro jam 687 esperantistoj el 26 landoj aliĝis al la Universla Kongreso en Oslo.

La kongresa libro aperos jam en junio, por ke la kongresanoj antaŭe povu pristudi la detalan programon.

**Flandra Ligo Esperantista.**

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis. U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35. Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

Kongreso de la Internacia Post-unuigo en Bruselo 1952.

Flandra Ligo petis al la delegitoj de Belgujo ĉe la internacia kongreso de la Post-unuigo, okazonta dum Majo 1952 en Bruselo, proponi la dulingvecon (la nacian lingvon kaj Esperanton) sur la internaciaj respondkuponoj.

Tiun iniciaton ni komunikis al d-ro Artur Bormann, komisiito de U.E.A. por dulingvaj dokumentoj.

Ĉu vi varbis?

Mi opinias ke jes, ĉar la nombro de la aliĝintoj estas nun pli granda ol je la sama momento en 1951. Antaŭen! Sekcio Brugge petis al la kasisto 40 amiko-atestojn. Kaj vi?

U.E.A.

Por la konkurso pri membreco de U.E.A. la kvoton kiun Belgujo atingis en 1951 estas 2.415 kiam ĝi sumiĝis nur je 1.971 en 1949 (unua internacia konkurso). La diferenco pravas ke dum la lastaj tri jaroj nia varbado por U.E.A. plene sukcesis. (asocia membro: 1 poento - membro kun jarlibro: 5 poentoj - membro-abonanto: 10 poentoj - membro subtenanto: 15 poentoj).

Esploro pri la socia konsisto de la Esperanto movado.

Ni ricevis demandaron de la internacia komisiono „Esperanto kaj sociologio“ por kolekti necesajn informojn ĉe niaj anoj. Komence de la monato vi do ricevos ekzempleron. Bonvolu kiel eble plej baldaŭ resendi ĝin al la sekretariejo, post serioza pleningado. Antaŭdankon!

la sekretario.

Oproep aan de leden, welke hun lidgeld voor 1952 nog niet vereffenden:



De bondspenningmeester verzoekt U zo haastig mogelijk de gelden te willen storten op de bondsrekening. Een stortingsformulier zal ter herinnering aan het Mrt.-nummer van ons blad worden toegevoegd en omstreeks veertien dagen later zal eventueel door de postbode een kwijtschrift aangeboden worden. Laattijdige betaling kan tot vertraging in de verzending van ons blad aanleiding geven. Stort dus zonder verwijl.

3e lijst van steunabonnementen (tot 12/2'52):

- F-ino J. Terrijn, Gent 150-
- S- M. van Gestel, Mechelen 150-
- S- F. Piot, Leuven 150-

Komuniko por la sekcioj:

La liga kasisto petas resendon de la nepagitaj memborkartoj de 1952, antaŭ la komenco de la monato.

Jam nun mi povas komuniki ke la nova sistemo tre kontentige efikis. Mi dankas ĉiujn kiuj iel helpis akiri tiun rezultaton. Speciale mi devas citi la modelan laboron de sekcio Gent, kiu konigis al mi la definitivan situacion de la varbado jam antaŭ 15/2.

Vojaĝante karavane al Oslo vi evitas monperdon kaj zorgojn!

**NIEUWS VOOR BOEKENLIEFHEBBERS!**

Onze boekendienst heeft beslag weten te leggen op een partij nieuwe boeken, waarvan de meesten reeds lang uitverkocht zijn en buiten ons niet meer te leveren, en biedt deze, zolang de voorraad strekt (van verschillende boeken zijn slechts enkele ex. voorradig!), aan tegen sterk verlaagde prijzen, die echter alléén gelden voor leden van onze vereniging en abonné's van ons blad. Indien U na 8 dagen nog geen bericht hebt, (in Uw bestelling naar deze speciale aanbieding verwijzen, s.v.p.) is het gevraagde niet meer te leveren. Portokosten voor koper.

Woordenboeken en Studieboeken:

Esperanto-woordenboek van A. v. Straaten, Esp.-Ned. en Ned.-Esp. (zeer uitgebreid), groot formaat, 688 blz, geb. f. 7,25; Beknopt Esperanto-woordenboek van A. v. Straaten, geb. f. 4,35; Schidlof woordenboek Esp.-Ned. en Ned.-Esp., geb. van f. 2,75 voor f. 2,15; M. de Waard: Het Esperanto-Examen (leerboek) f. 0,85; M. de Waard: Het Esperanto B-examen (leerboek) van f. 2,75 voor f. 1,95; P. Heilker, uitgebreid Esperanto-leerboek voor gevorderden van f. 2,35 voor f. 1,95; bijbehorend oefeningboek van f. 1,30 voor f. 0,65; A. Rozendal: Mi parolas Esperanton (een handig boekje ten gebruike na de beginnecursus) f. 0,75; Alle congresredevoweringen van dr. L. Zamenhof (moet ieder esperantist bezitten!) f. 0,50; B. Collinder: La problemo de Lingvo Internacia (een verzameling radio-redevoeringen, speciaal aanbevolen aan alle propagandisten) f. 0,50 en ten slotte als speciale aanbieding het „boek van de maand“ E. Bellamy: Rigardante Malantaŭen (In het jaar 2000) geb. van f. 3,90 voor f. 2,75.

Adres: H. A. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.

**ESPERANTO EN ONDERWIJS**

Het Bureau „Esperanto bij het Onderwijs“ heeft besloten geheel of gedeeltelijke restitutie van examengelden te verlenen aan kwekelingen, die dit jaar examen voor diploma A of B willen afleggen en een daartoe strekkend verzoek bij het Bureau indienen.

In de grote vakantie zal het Bureau „Esperanto bij het Onderwijs“ een goedkope cursus Esperanto geven voor kwekelingen, eventueel gesplitst in een groep voor beginners en één voor gevorderden.

**Plaatselijk Nieuws**

**Arnhem:** Sekcio Arnhem aliĝis al U.E.A. kiel membro-abonanto. Imitinda ekzemplo por aliaj sekcioj!

**Groningen:** 6/3 S-ro H. Behr montris lumbildojn; 13/3 Prelego de f-ino A. Brill; 20/3 Komuna vespero kun „Norda Stelo“ en R. Weeshuisstr.; 27/3 S-ro H. Albers rakontos.

**Rotterdam:** Prof. d-ro I. Lapenna parolos sabaton 8/3 je la 20 h. en „Ronde“, Beursgebouw, Meent 132, Rotterdam pri la temo „Kun la partizanoj en la montoj kaj arbaroj de Jugoslavujo.“ Grandegan impreson faris ĉi tiu prelego antaŭ nelonge en Londono. Ankaŭ neroterdamaj esperantistoj profitu ĉi tiun unikajn okazon aŭskulti d-ron Lapenna. Enirprezo g. 0,50. Kartoj haveblaj ĉe la sekr. de la kunlaborantaj sekcioj kaj ĉe f-ino M. H. Vermaas, Nw. Binnenweg 70, R'-dam, tel. 50748.

**V.E.B. Afdeling Brussel:** (Monico — Brabantstr. 2; vendrede 20-22 h.): Ons programma voor Maart is als volgt: 7/3 Kursussen A en B en gezamenlijke arbeid; 14/3, Kurs. A en B en Komische taalmoeilijkheden uit het Nederlands vergeleken bij het Esperanto; 21/3, Kurs. A en B en Esperanto twistvragen; 28/3, Kurs. A en B, Gezamenlijke vertaling uit het Esperanto.

**V.E.B. Afdeling Gent** (sekr.; H. Pirenneaan 25); Op 30 Januari had in ons gewoon lokaal: Café de Gand, Graaf van Vlaanderenplein, 10. om 20 u. de Jaarlijkse Algemene Vergadering plaats. Wij hoorden een samenvatting van de werkzaamheden van onze leden gedurende het jaar 1951, wierpen een oogopslag op onze financiële toestand (geldzorgen hebben wij niet) en kozen een nieuw bestuur.

Ziehier de samenstelling: Voorzitter: hr. De Boes. Ondervoorzitter: hr. van Ryckeghem. Sekretaris: hr. Van de Velde. Schatbewaarder: hr. R. de Schepper. Feestleider: hr. J. de Mol. Bibliotheekaris hr. L. Besbrugge.

Als gevolg van de cursus gegeven door Mr. De Boes, hadden wij het genoegen vier nieuwe leden te begroeten. Aan leraar en leerlingen nog veel geluk in Esperantoland.

**V.E.B. Afdeling Mechelen** (merkrede en Meisjeslyceum, Veemarkt 37). Agenda voor Maart werd vastgesteld zoals hierna: 5/3, Enigmog; 12/3, Grammatiko; 19/3, Prelego; 26/3, Diversajoj. Zestien onzer leden namen deel aan het Esperanto-feestje te Antwerpen op 16 Februari; het mocht wel als geslaagd bestempeld worden. Gratulojn al Antwerpen.

Kopij voor het volgend nummer inzenden vóór 14 Maart s.v.p.

**NAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.**

PREMION akiris post n-roj 121-122: s-ro R. Iserentant, el Brugge, por VEB; kaj por LEEN: s-ino J. Dommerholt - Boshof, el Arnhem.

**SOLVOJ.**

123. *Horiz.*: manik, kaper, rekomendind, dungo, teren, kiosk, ŝanel, preterirint, lulil, kviet.

*Vert.*: marod, kupol, nekonsolebl, kombi, kreol, kanot, ŝmink, pligrandigi, redon, lutit.

124. Unu el pluraj bonaj: morto, pasto, palato, nokto, ligno, trupo, okazi, palto, karno, limako, balono, sturno, opero, ŝelko, lampo, opinio, ekstra, telero, etiko, korto, pirolo, lariko, rajto. Bonaĵo ne bezonas reklamon.

**125. SILABENIGMO.**

El la 102 subaj silaboj kunmetu 29 oklitrajn vortojn laŭ la klarigoj. Iliaj triaj literoj, samorde legataj, formas proverbon.

1. li sidas sur ĉevalo; 2. ĝi fermas koverton; 3. ĝi troviĝas en horloĝo; 4. planto; 5. helpi ĉe io pene farebla; 6. aldoni la saman kvanton; 7. eligi parfumon; 8. opinio ion tute simila al alia; 9. ŝi estras ekz. hotelon; 10. skatolo kun bezonataj objektoj por tualeto; 11. iu perdinta kapablon uzi membron; 12. malvarma frandaĵo; 13. ne kunpreni; 14. pecigebla; 15. aerfluo tra ejo; 16. kurba; 17. iu saŭco; 18. ĉiukonsente; 19. kompleta; 20. nekornato; 21. brulego; 22. singulti; 23. amika saluto; 24. jusa; 25. prononci; 26. stumpli; 27. gasto; 28. promesitino; 29. arkipelago.


*Silaboj*: a, a, an, bla, bli, blo, bon, ce, cen, ci, ĉi, da, dan, den, dent, di, do, du, du, du el, fa, fa, fi, frem, fres, gi, gi, gi, gla, glu, ĝe, i, in, in, in, jo, jo, jo, ka, ka, ka, kres, kri, la, la, li, li, lo, lo, ma, mal, man, man, mar, mas, me, mi, mo, ne, ne, ni, no, no, nu, o, o, o, on, pa, pe, plor, plu, post, pre, ra, raj, rek, ri, ro, ro, rom, sen, si, su,

su, ta, ta, ti, ti, to, to, tra, tri, u, vi, vo, zo.

**126. KRUCVORTENIGMO.**

(Ĉiuj vortoj estas senfinajaj). *Horizontale*. 1. aŭtonomio. 3. karto de urbo; ĝi estas trovebla en abelujo. 5. nutraĵo el hepato de anasoj. 7. signo uzata en muzikskribo. 8. esti en ega favoro; ilo por movi pezan objekton. 10. nee skui la kapon; plibeligi.

*Vertikale*. 1. vortero aldonata al radikoj. 2. funde lerni. 3. perdinta kapablon uzi membron. 4. ekzistanta jam de la momento kiam iu venis en la vivon. 5. eligi tre laŭtajn voĉsonojn. 6. povanta esti tuŝesplorata. 7. elseligi idojn post sidado sur ovoj. 8. festotago. 9. rapide skuadi. 10. eljeti salivon. 11. metalo.



La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel antaŭ la 20-III-52.

**LA ANSTATAŬANTO**

(El la germana de T. Resa resumis kaj tradukis A. J. K.)

Kiel kirlovento mia amiko Otmar, la trombonisto, eniris kaj abrupte finis mian dolĉan sieron.

„Vi, ulo, feliĉa mi estas kaj vi povos fari min la plej feliĉa el ĉiuj mortuloj!” li kriis, skuante min tiel, ke mi apenaŭ sukcesis eviti korpan lezon.

„Ĉu?” mi demandis, pro konsterniĝo englutante mian cigarstumpo.

„Jes, vi, plej angela, plej orkora, plej brava...”

„Aŭdo, Otmar”, mi ĝeme diris post kiam la cigarstumpo pasis mian faringon, „parolu kaj kondutu prudente: se ne, mi tuj rifuzos — kiom vi bezonas?”

Sed monon li ne bezonis. Li deziris forvojaĝi — li pretekstis jubileon de sia onklo, sed kompreneble temis pri amaventuro — mallonge, ĉiukaze, „ĉe se li riskus la vivon”, Otmar devis iri. Sed neniam la orkestrestro tuj antaŭ la prezentado donas forpardonon kaj ĉar Otmar nur antaŭ tri semajnoj aliĝis al la teatra orkestro kaj ankoraŭ ne konis siajn kolegojn, li ne havis anstataŭanton.

Neniu sciis savon el la situacio, sed al Otmar ĝi ne prezentis problemojn. Mi! — mi, kiu neniam en mia vivo blovis ion alian ol varmegan supon, anstataŭ lin.

„Sed ulo, mi ja ĉe ne scias, kia trombono aspektas!”

„Vi ja kelkfoje vizitis la teatron kaj vidis min tie en la orkestrejo; vi nur eksidu, prenu la trombonon kaj atente observu la alian tromboniston. Vi precize imitu la movojn de mia kolego — kompreneble vi ne blovu — estas absolute neeble distingi en plena orkestro ĉu unu aŭ du ludas trombonon.”

„Sed...”

„Nenia sed! — Ankaŭ Musaf, la alia trombonisto jam foje anstataŭigis sin — neniu rimarkis ion kaj poste ni ridis...” Dirante tion li tiel forte frapis miajn ŝultrojn ke mi preskaŭ svenis. Kion fari? Li petegis, flatis kaj furiozis; mallonge: nur por liberiĝi de li mi fine konsentis.

Je la oka mi kun mallevita kapo eniris la teatron — la afiŝoj per surgluitaj strioj anoncis lastmomentan programŝanĝon — nu, al mi estis egale ĉu mi ne ludos uverturon aŭ marŝon.

Kvin minutojn poste mi, mizera kaj malespera, okupis mian lokon en la orkestrejo. Venis pliaj muzikistoj — oni aldonis muzikfoliojn — agordis instrumentojn. Jen mia kolego, la dua trombonisto! Li do estas Musaf. Kiel li rigardas min! — certe li jam divenis la trompon! Li snufas kiel rosmaro kaj brue purigas la nazon. Servole ankaŭ mi jam palpas mian nuztukon, sed ne, en tio mi ja ne bezonas imiti lin!

Jen la orkestrestro surpasas la podion. Li frapas — sekvas mallonga silento sed tuj poste eksplodas tondra bru. Kaŝe sed intense mi observas mian kolegon. Se li nur ne tiel fikse rigardus

min! Sendube li pro ia detektiva talento unuavide konstatis la trompon! Certe li jam komprenis, ke mia scio pri trombonblovado estas nula! Ankaŭ la orkestrestro komencas strabi al mi. Li gestas kaj kuintiras la brovojn. Feliĉe denove komenciĝas orelišira bru, kiu forturnas la atenton, kiun oni dediĉas al mi.

Subite regas profunda silento. La estro levas la bastoneton kaj signalas al ni! — Musaf rigardas min; mi rigardas lin — ambaŭ ni miras pri la orkestrestro, kiu faras veran indianan dancon antaŭ sia pupitro. Se li per la bastoneto nur ne gestus al Musaf kaj mi! Ve — ĉu eble ni blovu?! Kiel ne blovas Musaf? Iu puŝas miajn ripojn: „La solopasaĵo por trombono — rapide — ĉu vi dormas?”

Jen la katastrofo! — kio do okazas al Musaf? Mi levas la trombonon — feliĉe fine li ŝajne memoras sian devon — ankaŭ li levas la instrumenton. Mi tiras plenforte — same li — sed daŭre regas profunda silento. Mi plenblovas miajn vangojn ĝis miaj okuloj elstaras el la kapo — ankaŭ Musaf plenblovas la vangojn — regas tomba silento same kiel antaŭe.

En la parketo la homoj mokridas. Sur la balkono kelkaj aplaudas kaj en la galerio aŭdiĝas voĉo: „majstra soludo; brave!”

Jen la orkestrestro gestas kaj trumpetoj, violonoj, kornoj, flutoj kaj kiel ajn tiaj aĵoj nomiĝas, elverŝas torenton da muziko super nian malvenkon.

Elektra sonorilo tintas; malrapide la kurteno leviĝas kaj la prezentado komenciĝas.

Mi provas eskapi, sed jam blue galonita ulo baras al mi la vojon — ankaŭ Musaf, tiu idioto, estas sub lia gardo. „Bonvolu atendi momenton en la vestejo, sinjoroj, la orkestrestro deziras paroli kun vi.”

Mi strabas al Musaf; Musaf rigardas min, se mi ne eraras, ĉe moke. Mi ne plu povas regi min kaj kriis: „Kial vi ne blovis la solopasaĵon, aĉulo!”

„Kial do vi ne blovis ĝin, kara?” „Ĉar mi estas azeno,” mi eksplodas, „ĉar mi anstataŭis mian amikon Otmar kaj ĉar li ordonis imiti vin en ĉio!”

„Nu, ĝuste la samon ja mi devis fari!” aŭdiĝis la voĉo de Musaf.

„Kion?”

„Mi ja tute ne estas Musaf! Mi jam antaŭ kelkaj semajnoj foje anstataŭis lin kaj imitis la alian tromboniston en ĉio, sed se vi neniel ekzemplas al mi, mi ja ne povas imiti vin, ĉu?”

Pri la posta sceno mi prefere silentas. Otmar kaj Musaf apenaŭ evitis maldungon.

Pli alta potenco transprenis la taskon venĝi min je mia amiko Otmar; la ekskurso al „la jubileanta onklo” rezultigis lian edziĝon....

**BIBLIOGRAFIO**

*Jarlibro 1952 de Universala Esperanto Asocio*, (unua parto;) 264-paĝa enhavas la kutimajn rubrikojn kaj informojn: adresojn de landaj asocioj (aliĝintaj al U.E.A. kaj ne-aliĝintaj al U.E.A.), de kunlaborantaj fakaj asocioj kaj de la Esp.-gazetaro. Krome ĝi enhavas la kongres-regularon, kongresojn kaj somerajn aranĝojn, okazintajn en 1952, adresaron de la Akademio, liston de verkoj aperintaj en 1951 kaj la adresojn de delegitoj kaj fakdelegitoj. La individuaj membroj de U.E.A., kiuj senpage ricevas la jarlibron, sendube ĝojas pri la frua apero de ĉi tiu konsultlibro, fakte ne malhavebla por ĉiu aktiva esperantisto. U.E.A. laŭ la jarlibro havas nun 1025 delegitojn kaj 811 fakdelegitojn en 61 landoj (la antaŭan jaron 1014 delegitojn kaj 785 fakdelegitojn en 60 landoj). La jarlibro ne estas aĉetebla, do se oni deziras ricevi ĝin, oni fariĝu individua membro pagante g. 3,75 (anoj de L.E.E.N. g. 3,50) aŭ b. fr. 50 al la landa reprezentanto (en Nederlando P. Moen, Schaarsbergenstr. 104, Den Haag, pĉk. 79167; en Belgio F. Couwenberg, Koninginneaan 14, Blankenberge, pĉk. 4161.35). Se oni krome deziras ricevi la monatan revuon „Esperanto”, la kotizo estas g. 10,- (anoj de L.E.E.N. g. 9,75) aŭ b. fr. 140.

*Modesta Bukedo*; prozo-kaj poemoj originalaj kaj tradukitaj de Karl Jost, eld. de la aŭtoro. La proza parto de ĉi tiu plaĉaspekta libreto enhavas kelkajn artikolojn pri nia lingvo, ĝia aŭtoro kaj la esperantismo. En „Nia Lingvo” la aŭtoro, konata svisa Esp.-pioniro, kiu esperantistiĝis jam en 1903-a, donas kelkajn ekzemplojn pri la evoluo de Esperanto (prefiksan uzadon de la sufiksoj „et” kaj „in”, tendencojn al mallongigo pere de la t.n. „senpera verbigo”, k.t.p.). La proza parto krome enhavas tradukojn de svisa kaj malaja legendoj. La poezian parton konsistigas i.a. kelkaj originalaj poemoj ekz. „Nova Espero” kaj „Al la esperantistoj” (laŭ Zamenhofs modeloj) kaj poemoj, tradukitaj el germana lingvo (La Lorelej’ de H. Heine, Rozo erikeja de J. W. Goethe k.a.) kaj kelkaj naciaj kantoj, tradukitaj el la svisa lingvo. La libreton kompletigas kelkaj aforismoj, sentencoj kaj vortludoj. La lingvaĵo de ĉi tiu senpretenda verketo ĝenerale estas bona kaj facile legiĝas. Ni trovis nur kelkajn preserarojn kaj lingvajn nekorektaĵojn, ekz. kie june (juna) ĝojis mi (p. 72); apud la Weser (p. 55); ĉirkaŭ (ĉirkaŭ) min per ĉarma iluzi’ (p. 44). Neologismoj preskaŭ tute forestas (liedo; jasi; seno). Prezo gld. 1,50 aŭ b. fr. 24,-; havebla ĉe la libroservoj.

**INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ**

okazos 25/7 - 1/8 1952 en Helsingör (Danujo)

Post la kursoj okazos aŭtobusa karavano por la gekursanoj al la U.E.A.-kongreso en Oslo

Petu tuj detalajn prospekton kaj informojn ĉe J. Th. de Goeij Luzacstraat 21a, Rotterdam-C.

**JAARVERSLAG 1951 EXAMENCOMMISSIE**

De Examencommissie bestond uit 12 leden, nl.: de heer G. J. Degenkamp (voorz.), mej. H. M. Mulder (secresse), de heren H. A. de Hoog, dr W. A. J. Manders en mr A. J. Kalma (vice-voorzitters) en de heren Fr. Wigb. van Zon, L. Weyts, R. v. Spronsen, J. U. Hommes, W. F. Kruit, F. Weeke en B. Wels; na het overlijden van Fr. Wigb. van Zon uit 11 leden. Gedelegeerde van de min. van O.K. en W. de heer dr W. v. d. Ent.

Vier examens werden gehouden, nl. 3 Mei te Amsterdam en Leeuwarden, 16 Juni te Den Haag en 3 November te Utrecht.

Statistiek betr. aantal kandidaten:

	Aangem.		Opgek.		Geslaagd	
	A	B	A	B	A	B
Amsterdam	48	9	43	7	25	4
Leeuwarden	16	4	15	4	12	2
Den Haag	50	2	49	2	30	1
Utrecht	42	11	38	11	25	7
Totaal	156	26	145	24	92	14

Overzicht geslaagden en organisaties:

	A	B
FLE	39	8
LEEN	21	4
NK	2	1
KUNE	0	1
Niet georganiseerd	30	0
Totaal	92	14

**ESPERANTO FACULTATIEF LEERVAK**

Ter gelegenheid van de op 5 Febr. in de Tweede Kamer gehouden debatten over de nieuwe Kweekschoolwet deelde de minister mede, dat binnenkort een wijziging van de Lager-Onderwijswet zal worden ingediend om het onderricht in Esperanto als facultatief leervak op de lagere school mogelijk te maken. (De nieuwe Kweekschoolwet laat de mogelijkheid voor Esperanto-onderwijs als keuzevak open).

Dit succes is zeker voor een groot deel te danken aan de activiteit van het bureau „Esperanto bij het Onderwijs”, dat we hiermee van harte geluk wensen.

Aan de „Handelingen der Staten-Generaal, Tweede Kamer” 31/1 1952 ontleen wij resumerend hieromtrent het volgende.

De heer Van Sleen bracht een door hem ingediend amendement in herinnering, dat tot doel had Esperanto op te nemen onder de facultatieve vakken voor het Lager Onderwijs. Hoewel dit amendement door verschillende afgevaardigden werd gesteund, was dit door spr. teruggenomen, omdat de minister had meegedeeld, dat hetzelfde bereikt kon worden door toepassing van art. 25 en art. 90, die de min. machtigen, op aanvraag vergunning te verlenen tot onderwijs in Esperanto. Hoewel min. Gielen echter destijds de toezegging deed, dat hij iedere aanvraag, die aan de gestelde eisen voldeed, zou inwilligen, werd 11/4 1950 een verzoek om Esperanto te onderwijzen afgewezen. Daarom verzocht de heer Van Sleen nogmaals, Esperanto op te nemen, desnoods onder de verplichte vakken met de restrictie, dat van die verplichting vrijstelling kan worden verleend. Ook in het ontwerp van de nieuwe Kweekschoolwet, aldus de heer Van Sleen, wordt Esperanto niet genoemd, hoewel de min. destijds aan het Bureau „Esperanto bij het Onderwijs” de toezegging deed, aan opnemng van Esperanto onder de verplichte vakken de nodige aandacht te zullen schenken. Ook mevr. Fortanier-de Wit achtte de gang van zaken niet bevredigend en vroeg, of de kweekschool vrij is, onder de keuzevakken ook Esperanto op te nemen. Deze vraag werd door min. Rutten bevestigend beantwoord. Aan de heer Van Sleen antwoordde de min. dat hij de verzoeken om Esperanto te onderwijzen had afgewezen op advies van de Onderwijsraad, maar dat hij een wijziging van de Lager-Onderwijswet voorbereidde, die het mogelijk maakt, Esperanto aan een lagere school te doceren, en dat hij verwachtte, dat dit wijzigingsontwerp binnenkort ahangig zou worden gemaakt.

Sveda Esperanto-Federacio aranĝos per sia Esperanta Turista Komisiono aŭtobusvojaĝon tra Nederlando, kiun partoprenos proks. 40 gesamideanoj de 14/4 - 24/4. Sinsekve ili vizitos Arnhem, Utrecht, Amsterdam, Haarlem, Alkmaar, Volendam, Marken, Den Haag, Delft, Rotterdam, Den Helder, Texel, Groningen. Lokaj gesamideanoj helpas en la aranĝo de diversaj ekskursoj, k.t.p.

**DRUKKERIJ KROL - UITHUIZEN**

Hoofdstraat 31 - Telef. 105  
drukt keurig, snel en billijk Uw Tijdschriften, Boekwerken, Handelsdrukkerijen, enz.

Vraagt eens aan!  
Nederlands - Esperanto - Frans enz.

A-examen.

Percentage geslaagden ruim 63. De c-ie is van mening, dat zowel kandidaten als cursusleiders de exameneisen onderschatten. Het is zeer te betreuren dat onder de afgewezenen vaak personen zijn, die blijken hun ontwikkeling zeker moesten slagen, maar juist door hun ontwikkeling de studie hebben onderschat. Een beginnecursus is niet toereikend als opleiding voor het examen maar voor dat doel moet een vervolgcursus bestemd worden.

(slot in het volgend nummer)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)